

**PRECIPAJ LIKENAJ SUBSTANCOJ DE KELKAJ TAKSONOJ PRISKRIBITAJ FAR ROUX  
KUNLABORE KUN ALIAJ AŬTOROJ**

**(Principales substances lichéniques de quelques taxons décrits par ROUX  
en collaboration avec d'autres auteurs)**

**far Claude ROUX<sup>1</sup>**

**RESUMO**

Priskribo de la precipaj likenaj substancoj (\*\*\*: abunde; \*\*: mezkvante; \*: spure) de kelkaj taksonoj priskribitaj far ROUX kunlabore kun aliaj aŭtoroj.

Acarospora undata Clauz. Roux et Wirth (korektnome Acarospora isortoquensis Alstrup) : norstikta acido\*\* (sen rizokarpa acido); Lecanora albula v. vocontia : protocetrara acido\*\* kaj usnea acido\* (v. albula : usnea acido\*); Lecanora eminens (tala randaĵo de apotecioj !) : psoroma acido\*\* kaj usnea acido\*; Lecanora poeltiana : psoroma acido\*; Lecanora psarophana v. aquilina : girofora acido\*\*\* (v. psarophana : lecanora acido\*).

**RESUME**

Détermination des substances lichéniques principales (\*\*\*: abondante; \*\*: en quantité moyenne; \* : à l'état de traces) de quelques taxons décrits par ROUX en collaboration avec d'autres auteurs.

Acarospora undata Clauz. Roux et Wirth (nom correct : Acarospora isortoquensis Alstrup) : acide norstictique\*\* (pas d'acide rhizocarpique); Lecanora albula v. vocontia : acide protocétrarique\*\* et acide usnique\* (v. albula : acide usnique\*); Lecanora eminens (bord thallin des apothécies !) : acide psoromique\*\* et acide usnique\*; Lecanora poeltiana : acide psoromique\*; Lecanora psarophana v. aquilina : acide gyrophorique\*\*\* (v. psarophana : acide lécanorique\*).

**ENKONDUKO**

Hodiaŭ, la priskribo de nova taksono preskaŭ nepre konsistas ne nur el morfologia kaj anatomia priskriboj sed ankaŭ el listo de la ĉefaj likenaj substancoj, kiuj nuntempe grave rolas en taksonomio kaj eĉ en sistematiko. La celo de tiu ĉi artikoleto estas kemikampe kompletigi la priskribojn de kelkaj novaj taksonoj, kiujn mi priskribis kun aliaj aŭtoroj.

---

<sup>1</sup> Laboratoire de botanique et écologie méditerranéenne, Institut méditerranéen d'écologie, Faculté des sciences et techniques de Saint-Jérôme, rue Henri Poincaré, F — 13 397 MARSEILLE cedex 13

## METODO

La analizo de la likenaj substancoj estis farita per kromatografio sur silica ĵeleaĵo, laŭ la metodo de CULBERSON kaj CHRISTINSSON (1969) modifita far CULBERSON kaj AMANN (1979).

### **Acarospora isotorquensis Alstrup (= A. undata Clauz., Roux et V. Wirth, 1982 : 35-39)**

La holotipon de Acarospora undata Clauz. et Roux jam kromatografie studis PURVIS k al. (1985). Tial, por ŝpari la tipmaterialon malabundan, ni studis nur specimenon trovitan en monto Aigoual (Herbario C. ROUX : S-Francio, Cevenoj, Gard, monto Aigoual, apud arboretum de Hort-de-Dieu, alt. 1400 m, sur subkorbelo SE-orientiĝa, 210° dekliva, el metamorfa skisto nekalka). Same kiel PURVIS k al., ni ne trovis rizokarpan acidon, kio konfirmas la aserton de ĉi tiuj aŭtoroj, nome, ke la likeno ne apartenas al la subgenro Acarospora, kiu grupiĝas la flavtalajn speciojn. Kontraŭe, ni trovis, relative abunde, norstiktan acidon, kiun PURVIS k al. ne sukcesis trovi en la holotipo. Efektive, Acarospora isortoquensis havas talon tre K+ (sangoruĝa; permikroskope ruĝaj kristaloj) kaj sekve devas logike enteni norstiktan acidon. La netrovon de ĉi tiu acido en la holotipo klarigas PURVIS k al. pro la relative alta enteno de la substrato kaj de la talo en kupro (Cu), kiu kombiniĝus kun norstikta acido por formi substancon kun aliaj ecoj. Se tiu hipotezo estas ĝusta, la Acarospora isortoquensis de la monto Aigoual devas estis relative malriĉa en kupro.

**Rimarko** : PURVIS k al. rigardas A. isortoquensis kiel modifiita pro kupro Acarospora smaragdula, tio kion CLAUZADE kaj ROUX (1985 : 886) opinias necerta.

### **Lecanora albula v. vocontia Clauz. et Roux (1985 : 823)**

Tiu ĉi vario diferencas de la tipo pro kemiaj karakteroj de la talo kaj de la tala randaĵo : dum v. albula estas P-, vario vocontia Clauz. et Roux estas tre P+ (orange ruĝa). Kromatografio de ambaŭ vario montras, ke la tipo entenas usnean acidon (mezkvante) dum v. vocontia entenas ne nur usnean acidon (mezkvante) sed ankaŭ protocetraran acidon (pli abunde).

### **Lecanora eminens Asta, Clauz. et Roux (in VĚZDA, 1975a k 1975b)**

La originala diagnozo de tiu ĉi specio (ASTA, CLAUZADE kaj ROUX en VĚZDA, 1975a) estas nekompleta (la priskribo de la morfologio de la apotecioj estis erare ne presita) ; krome la nomo estis malĝuste skribita (Lecanora prominens anstataŭ eminens : v. korekton en VĚZDA, 1975b) ! Kompletan priskribon de tiu ĉi specio la leganto trovos en CLAUZADE kaj ROUX (1985 : 425). Ĝin bone karakterizas i.a. tala randaĵo P+ (flava). Tial ni kromatografiis la apoteciojn (inkl. talan randaĵon) : ili entenas usnean acidon (mezkvante) kaj ĉefe psoroman acidon. Kompreneble, el psoroma acido devenas la reakcio P+ (flava) de la tala randaĵo.

**Lecanora poeltiana Clauz. et Roux (1984 : 188-194)**

La talo de tiu ĉi specio entenas iom da psoroma acido, nesufiĉe por ke oni observu reakcion kun P. La apotecioj ne estis studitaj. Tiu specio estos verŝajne pli funde studita poste, kunlabore kun Prof. D-ro J. POELT.

**Lecanora psarophana v. aquilina Clauz. et Roux (1985 : 823)**

Tiu ĉi vario diferencas de la tipo pro medolo C+ (ruĝa) kaj verŝajne ankaŭ pro apudmareco, sed nek morfologie nek strukture (i.a. iliaj sporoj estas identaj). Ni kemie studis kaj v. psarophana kaj v. aquilina : ili ĉi-rilate bone diferencas inter si : v. aquilina entenas relative grandan kvanton da girofora acido, kiu klarigas la reakcion C+ (ruĝan), dum v. psarophana entenas nur spurojn da lecanora acido, ne sufiĉe, por ke oni observu reakcion kun C.

**Hypocenomyce stoehadiana Abbassi Maaf et Roux (1985 : 189-194)**

Tiu ĉi specio, kies talo entenas substancon parenca al atranorino, estos iam pli funde studita kunlabore kun P. CLERC.

**DANKOJ**

Ĉi tiun laboron mi faris okaze de restado en la laboratorio de J.-C. BOISSIÈRE (Station de biologie végétale de Fontainebleau (pron. Fontenblo), Francio) kaj en la laboratorio de K. AMANN (Botanische Institute, Bern, Svisio), sub la gvidado de P. CLERC. Mi tre dankas al tiuj kolegoj, kiuj afable kaj pacience inicis min al la metodoj de kromatografio de la likenaj substancoj.

**BIBLIOGRAFIO**

- ABBASSI MAAF L. et ROUX C., 1985. — Hypocenomyce stoehadiana, nova likenspecio (Hypocenomyce stoehadiana, nouvelle espèce de lichen). Bull. Soc. linn. Provence, **36** : 189-194.
- CLAUZADE G., ROUX C. et WIRTH V., 1982 (1981). — Acarospora undata sp. nov. Bull. Mus. Hist. nat. Marseille, **41** : 35-39.
- CLAUZADE G. et ROUX C., 1984. — Deux espèces nouvelles de lichens méditerranéens : Lecanora poeltiana Clauzade et Roux sp. nov., Verrucaria poeltiana Clauzade et Roux sp. nov. In : HERTEL H. et OBERWINCKLER F., Festschrift J. POELT. Nova Hedwigia, **79** : 187-202.
- CLAUZADE G. et ROUX C., 1985. — Likenoj de Okcidenta Eŭropo. Ilustrita determinlibro. Soc. bot. Centre-Ouest édit., Royan, 893 p.
- CULBERSON C.F. et AMMANN K., 1979. — Standardmethode zur Dünnschichtchromatographie von Flechtensubstanzen. Herzogia, **5** : 1-24.
- CULBERSON C.F. et KRISTINSSON H.D., 1970. — A standardized method for the identification of lichen products. J. Chromatography, **46** : 85-93.

- PURVIS O.W., GILBERT O.L. et JAMES P.W., 1985. — The influence of copper mineralization on Acarospora smaragdula. Lichenologist, **17**(1) : 111-116.
- VĚZDA A., 1975a. — Lichenes novi quorum isotypi in fasciculo quinquagesimo tertio collectionnis "Lichenes selecti exsiccati" distribuentur. Fol. geobot. phytotax., Tchécoslovaquie, **10** : 325-327.
- VĚZDA A., 1975b. — Lichenes selecti exsiccati. Instituto botanico Academiae Sciencistarum Cechoslovacae, Průhonice prope Pragam, **55** : 1-7 (n°1351-1316).